

Intervjuo kun sinjoro Giorgio Silfer pri Kontakto

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 1977, 12-A-4-90

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-12/SRI-1977-12-A-4-90-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-sinjoro-Giorgio-Silfer-pri-Kontakto.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Hodiaŭ mi havas la horon fini serion da intervjuoj kun sinjoro Giorgio Silfer. La agado de sinjoro Giorgio Silfer preskaŭ ne havas precedencojn en la esperanto-gazetaro. Imagu, ke li ĉefredaktas samtempe la plej gravan revuon por la junularo, Kontakto, kaj la plej signifan okcidentan kulturan revuon, Literatura Foiro. Samtempe li estas kunlaboranto de Internacia Pedagogia Revuo kaj aperigas artikolojn, recenzojn kaj kritikajn eseojn en pluraj aliaj gazetoj, ankaŭ nacilingvaj.

Ĝuste pri Kontakto, pri ĝia deveno kaj pri ĝia nuna perspektivo ni deziras hodiaŭ aŭdi sinjoron Giorgio Silfer. Nu, kara amiko, al vi la parolon!

GS.- Kontakto atingis lastatempe sian kvindekan numeron, tio signifas ke dum dektri jaroj la revuo sukcesis atingi sian oran etapon. Ĝi naskiĝis kun iu specifa celo, nome, doni al la junularo kiu esprimiĝas per Esperanto internacian forumon, kie debati la problemojn, kiuj plej rekte koncernas ĝuste la junularon kaj en la daŭro de tiuj kvindek numeroj ŝajnas al mi ke ĝi restis fidela al tiu celo, kvankam estus bone eble substreki iun aspekton, iun specifan tendencon, nome, ke tiu junularo esperantista ĉefe bezonas legi artikolojn, kie oni motivas la ekziston de ilia esperantisteco kadre de la ĝeneralaj tutmondaj problemoj. Ĵeti, lanĉi ian rilaton inter la fakto ke mi estas juna esperantisto kaj samtempe ekzistas aliaj enormaj problemoj en la socio, kiu min ĉirkaŭas. Tiu ĉi ŝajnas esti, mi diru, la ekvilibra pozicio de Kontakto kaj per ĝi mi esperas ke oni atingos ankaŭ la centan numeron.

Cl.- Kontakto ĝis nun neniam fariĝis tre populara organo, kontraŭe al tio, kio ekzemple siatempe okazis por La Praktiko kaj nuntempe Esperanto de UEA. Kiel vi klarigas tion?

GS.- Mi iĝis ĉefredaktoro de Kontakto antaŭ du jaroj, proksimume, kaj tiam ekzistis tre forta malfruo en la apero de la revuo. Laŭ mi temas pri diabla fermita cirklo. Se la revuo estas malakurata, se la revuo aperas malregule, sporade, evidente la ne-membroj de TEJO, do tiuj, kiuj ne devige sin abonas, ne ricevas stimulon, ne ricevas kuraĝigon. Tiu ĉi estas la ĉefa problemo. La surmerkato dependas de la eldoneblecoj kaj laŭ mi la Centra Oficejo de UEA, kiu prizorgas la eldonadon de Kontakto ĉefe danke al la majstra kunlaboro de Stefan MacGill, ne povas ĉerpi siajn energiojn ĝuste por tiuj ĉi eldonaj agadoj. Aliflanke mi devas menci, ke ĝuste ekzistas miskomprenoj, konfuzoj pri la signifo kaj la rolo de Kontakto. Ĉi tie mi kaptas la okazon por emfazi ke Kontakto ne estas la organo de TEJO, ne estas oficiala organo. TEJO havas sian oficialan organon en la TEJO-paĝo de Esperanto de UEA. Sed Kontakto estas tute sendependa porjunulara kaj prijunulara revuo, kiu laŭ mi meritas la abonon kaj la subtenon de ĉiu esperantisto, ĝuste ĉar oni ne povas perdi laboron de generacio pro neglektado de la intereso de tiu junulara sekcio de UEA.

Cl.- Kaj nun, pri la estonteco de TEJO. Ĉu vi konas klarajn, precizajn projektojn?

GS.- Nu, persone mi ne estas la plej kompetenta respondi pri tio, ĉar mi ne estas en la estraro de TEJO. Mi devus diri, laŭ tute privata vidpunkto, ke mi pli multe konfidas en la juna

generacio de la esperantistoj ol en la mezaĝa. Nuntempe ŝajnas al mi ke ekzemple TEJO, aŭ kadre de TEJO oni sukcesas lanĉi minimume du konstantajn ĉiujarajn aranĝojn kun internacia valoro. Unu estas la Junulara Kongreso kiu okazos la venontan someron en Poitiers ekzemple en Francujo. Kaj la alia estas ekzemple la seminario de Germana Esperanto-Junularo. Tiuj ĉi estas fakte du internaciaj kongresoj, kiuj altiras ĉiam pli multnombrian partoprenantaron kaj se al tiuj aldoniĝus ankaŭ ekzemple la Internacia Junulara Festivalo en Italujo, ni havus mirindan triopon, kion ege malmultaj internaciaj junularaj organizoj kapablas oferti en la mondo.

Cl.- Sinjoro Silfer, ĉu vi longe ĉefredaktoris ?

GS.- Ĝis la venonta somero, kiam prenos mian postenon supozeble Jouko Lindstedt el Finnlando, kaj tiam la revuo havos plene akuratan eldonaperon.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de Literatura Foiro kaj Kontakto. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2013*